

Esperanto-grupo, subevoluo
Claude Gacond, 340-a radioprelego, 1970.04.15 & 18

Parolas sinjorino Andrée Gacond.

Ankoraŭ dum du semajnoj mi monologos, ĉar mia edzo devas flegi cerboskuon, kiu estas konsekvenco de aŭtomobila akcidento.

Mi legas al vi prelegon, kiun li povis mem verki.

En la monato februaro ni diris, ke ni havis la okazon viziti plurajn lokajn grupojn de Svislando, kaj ni donis niajn unuajn impresojn pri tiu kontakto. Ilin ni povas resumi per **manko de kunlaboro**.

Ĉiuj lokaj grupoj de Svislando, eble estas iomete same por la aliaj landoj, troviĝas antaŭ malfacilaĵoj, kiuj jaron post jaro komplikiĝas. Anstataŭ unuigi siajn talentojn kaj fortojn por solvi tiujn malfacilaĵojn, ili individue alfrontas ilin.

Tiu situacio memorigas la atmosferon, kiu regas en la subevoluintaj landoj. La fakuloj, kiuj iras en Afrikon, Sudamerikon aŭ Azion por alporti teknikan helpon, konsciiĝas, ke la ĉefa manko de la subevoluo troviĝas en manko de rilatoj inter la vilaĝoj, inter la komunumoj, inter la provincoj, kaj inter ĉiuj tiuj homgrupoj kaj la kompetentaj gvid-instancoj.

En tiuj landoj ĉiu homo-grupo vivas por si mem. Se en unu el tiuj grupoj oni solvis per teknika aŭ kultura progreso unu el la ĉiutagaj problemoj komunaj al ĉiuj grupoj, tiu solvo restas nekonata de la ceteraj grupoj.

Tial la progresoj ege malrapide disvastiĝas. Kaj tiu disvastiĝo dependas de la hazardo. La fakuloj, kiuj gvidas la teknikan helpon pli kaj pli konscias, ke tiu helpo sukcesas, nur se la helpataj homgrupoj komencas kunlabori kun la najbaraj komunumoj kaj kun la registaraj medioj.

Se ni atente ekzamenas la vivon de la esperanto-grupoj en Svislando, ni konstatas, ke ili vivas por si mem. Eĉ kiam oni organizas preleg-vojaĝon de famaj esperantistoj, estas tre malfacile konvinki la estrojn de la grupoj kunlabori por sukcesigi tiun vojaĝon. Eĉ kiam gazeto kiel *Svisa Espero* sin reorganizas por povi esti je la dispozo de la grupoj, tiuj grupoj daŭre aperigas mizerajn informilojn. Eĉ kiam tiu gazeto *Svisa Espero* estas senpage disdonata dum tuta jaro al la esperanto-gelernantoj, tiuj grupoj daŭre hezitas kunlabori. Tiel la gelernantoj nenion scias pri la loka grupa vivo. Eĉ kiam instrumentoj permesas aŭdvidan instruadon de esperanto, kaj kiam ĉiuj estas informataj pri tiuj novaj metodoj, la grupoj, kiuj malfermis kursojn, preferis daŭre instrui laŭ la klasikaj metodoj. Nur kiam la gelernantoj plendas, ke ili ne ricevas aŭdvidan instruadon kiel en la najbara urbo, tiam la kursgvidantoj devas reformi siajn instruteknikojn.

Sed en preskaŭ ĉiuj grupoj oni rezignis organizi kursojn. Ni povis eĉ rimarki specon de fatalismo. En la plej granda grupo oni uzis la gazetan reklamadon por anonci kurson. Aliĝantoj ne alvenis. Tiam, anstataŭ ekzameni, kial tiuj anoncoj ne plu sukcesis, oni decidis, ke ne plu valoras provi malfermi kursojn.

En Svislando kelkaj kluboj aŭ vesper-lernejoj iom post iom grupigis la instruadon por la plenkreskuloj. Ili estas la popoluniversitatoj, la Lernejo-Kluboj de Migros kaj Coop. En tiuj rondoj nun multiĝas vesperaj kursoj. Flanke de la esperantistoj maloftaj estis la ekprovoj kontakti tiujn instrumediojn.

La statistikoj estas malesperigaj. Jaron post jaro la nombro de la esperantistoj malkreskas. Kaj tiu fenomeno ne nur estas svisa. En la aprila revuo *Franca Esperantisto* ni legas :

1966 : 1445 membroj

Esperanto-grupo, subevoluo
Claude Gacond, 340-a radioprelego, 1970.04.15 & 18

1967 : 1264 membroj

1968 : 1124 membroj.

Legante tiujn ciferojn mi antaŭvidis, ke oni serĉos la kaŭzon de tiu malkresko. Ne. La konsekvenco estas demisio de la sekretario.

En Svislando ni rimarkas la saman fenomenon. Kiam la grupoj malfortiĝas, ni ne rimarkas serĉadon pri la kaŭzo de tiu stagnado. Okazas disputoj, demisioj. Kaj baldaŭ, kie antaŭe vivetis unu grupo, nun sin grupigas la esperantistoj en pluraj grupetoj. Tion ni povas rimarki en Genève, Lausanne kaj Zürich.

De jaroj Svisa Esperanto-Societo grupigas inter 200 kaj 300 membrojn. Se ni nombras la kursojn okazintajn dum la pasintaj jaroj, ni povas kalkuli, ke ĉiujare proksimume cent personoj lernis esperanton. Kial ili ne aliĝis al la Societo ? Kie ili nun troviĝas ?

Ni ekstudis tiun demandon, kaj ni povis konstati, ke la lokaj grupoj ne parolas al siaj novaj membroj pri la tutsvisa societo. La kontraŭo ekzistas. Kiam persono aliĝas al la tutsvisa societo, oni ĝenerale ne instigas lin samtempe aliĝi al la loka societo.

Ni eĉ rimarkis, ke la kurs-gvidantoj tute ne instruas pri la esperanto-vivo. Ili ĝenerale instruas la elementojn de la lingvo kaj poste lasas al la hazardo de la vivo la varbadon de tiuj novaj fortoj. La plej konvinkitaj lernantoj tiam ekrilatas kun la esperanto-movado. La ceteraj ekforĝegas esperanton.

Kaj kiam la hazardo ilin renkontigas kun esperantisto, ili tiam diras : „*Ha, esperanto ankoraŭ ekzistas!*“ Al tiuj personoj mi ĉiam demandas, kiam ili sekvis esperanto-kurson, kaj kial ili ne daŭrigis. Plej ofte la respondo estas : « *Sed post la kurso okazis nenio !* » aŭ « *Mi iris al la grupo, sed en ĝi oni ne atentis pri la komencantoj.* » Kiam oni raportas pri la ekzisto de la internaciaj kongresoj, oni konstatas, ke tiuj iamaj esperanto-lernantoj absolute nenion scias pri tiu aspekto de la lingvo.

Fakte la nombro de la esperantistoj ne malkreskas. Jaron post jaro ĝi kreskas. Se la esperanto-societoj tion ne respegulas, tio pruvas, ke ili perdis la gvidadon de la movado.

Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Andrée Gacond nome de Claude Gacond, kiu estis akcidentita. Ĝis reaŭdo !

-oOo-